

Michel Frésard, la unua administranto de Kultura Centro Esperantista, KCE
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1985 marto 07 kaj 09.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-140/Radiokasedo-140-2-878-1985-marto-Claude-GACOND-Michel-Fresard-la-unua-administranto-de-KCE.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond parolas kun Michel Frésard, la administranto de Kultura Centro Esperantista.

Ni ofte raportas pri la disvolviĝo kaj laboro de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Tiu kompleksa institucio, kies ĉefa celo estas la iom post ioma starigo de altlernejo, faris grandajn progresojn dum la pasinta jaro. Konstruiĝis novaj ejoj, interalie studejo, kiu ricevis la nomon Andreo Cseh, pasejon, kiu ligas en unu tuto la du ĉefdomojn, novaj gastĉambroj kaj meblitaj feriloĝejoj, kaj nuntempe finkonstruiĝas kuirejo kaj manĝejo, kiujn oni inaŭguros fine de tiu ĉi monato okaze de studa semajnfino.

Ĝis nun la administran laboron de tiu ĉi Centro efektivigis bonvoluloj, sed la aktiveco de Kultura Centro Esperantista kaj de ties fakoj senĉese kreskas. Alvenis la momento dungi kapablan administranton. Tiun ĉi homon oni trovis la pasintan jaron. Li nomiĝas Michel Frésard, kaj mi prezentas lin al vi hodiaŭ.

Michel Frésard, se mi ne eraras, vi konatiĝis kun esperanto okaze de armea kurso. Kiel mi, vi estis kunvokita en sanitara trupo somere de 1953, kaj tiel vi aŭdis la unuajn vortojn en esperanto.

M.- Efektive. Mi tre bone memoras kiam, kuŝantaj inter la aromplenaj herbejoj de St. Luzisteig, vi legis al mi paragrafojn de la Biblio en Esperanto.

Cl.- Tiam ni ekorganizis la unuajn semajnfinojn de la junulara sekcio de Svisa Esperanto-Societo. Se mi bone memoras, vi partoprenis semajnfinan renkontiĝon, kiu okazis en la junulara gastejo de la urbo Soloturno. Estis en la printempo 1954.

M.- Vitute pravas. Tie, mi ekkonis tiun specialan kaj tiel agrablan etoson, kiu regas en ĉiuj esperantaj renkontiĝoj. Aliflanke, mi memoras ke ni restis en Soloturno sabate kaj dimanĉe. Do, ni devis tranokti. Eble, la junulara gastejo estis iom komplika domo. Ĉiukaze, kiam mi devis ellitiĝi dum la nokto por iri al la necesejo, mi tute ne plu kapablis lokigi la dormejon de la viroj kaj, laŭdire, mi eniris tiun de la virinoj...

Cl.- Kaj vi pli kaj pli vigle kunlaboris al la dinamismigo de tiu junulara sekcio, kiu baldaŭ ricevis la nomon Esperanto-Junularo de Svislando. Vi estas muzikisto kaj estis instruisto, kaj dank' al vi ni havis agrablajn koncertojn ĉu en Adelboden, kie okazis skiferioj, ĉu en via vilaĝo Les Bois, ĉu okaze de vojaĝoj, kiel ekzemple en Martigues, en Sudfrancio.

M.- Mi plezure memoras niajn orgenkoncertojn, kiujn mi pretigis kun tiom da korinklino. Krom tiu de Martigues, kiu, evidente, estis tute improvizita. Vi memoras ke, kiam ni vizitis la vilaĝan preĝejon, mi grimpis al la tribuno kaj orgenludis ĝis kiam aperis la pastro. Supozeble, li antaŭe estis iom malkontenta pro mia invado de lia tereno. Sed, certe, lia malkontento malaperis kaj estis anstataŭita de nekredebla surprizo, kiam li vidis min. Efektive, mi estis

orgenludanta kvazaŭ senvesta. Necesas diri nun ke tio okazis somere dum niaj ferioj. Do, ni estis senzorge vestitaj, kiel la tutmondaj turistoj.

Cl.- Tiam ni ambaŭ eksperimente instruis esperanton en niaj vilaĝoj La Sagne kaj Les Bois. Venis viziti niajn gelernantojn japanoj, interalie la ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino. Estis la centjara jubileo de Zamenhof en 1959, niaj gelernantoj kantis kaj recitis esperanto-poemojn en ceremonio, kiu disvolviĝis ĉe la porinstruiista lernejo en Neuchâtel.

M.- Jes. Mi emocie memoras Joŝikon Kaĵinon, kaj tre malĝojiĝis kiam vi anoncis al mi ŝian tro fruan morton. Ŝi dancis tiel gracie kun siaj vivkoloraj kimonoj. Aliflanke, mi memoras la belegan kantaton de César Franck, kiun kantis niaj gelernantoj kun la esperanto-teksto de Charles Ecabert.

Cl.- Organiziĝis aliaj tiaj renkontiĝoj, sed iom post iom vi malaperis el la esperanto-vivo. Se mi ne eraras, la ĉefa kaŭzo de tiu retiriĝo estis viaj muzikaj studoj.

M.- Jes. Tiutempe, mi decidiĝis forlasi la instruon kaj fari pli altajn studojn muzikajn. Do, mi enmatrikuliĝis en la konservatorio de La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Kaj subite vi malaperis.

M.- Estas vere. Mi subite malaperis, kiam mi foriris al Sudameriko.

Cl.- Kial vi foriris al Kolombio?

M.- Pro multaj motivoj sed, ĉefe, kvazaŭ pro hazarda kialo. Fakte, foje mi legis en "L'Ecolier Romand" (la informilo, kiun mi ĉiumonate ricevis kiel edukisto) ke la Svisa Lernejo en Bogota serĉis instruistojn. Mi kandidatiĝis kaj estis elektita.

Cl.- Kiam okazis via translokiĝo al Bogota?

M.- Antaŭ dudek jaroj.

Cl.- Kaj ĉu vi instruis dum dudek jaroj en la Svisa Lernejo en Bogota?

M.- Ne. Kiam finiĝis mia kontrakto, mi renkontis - aliffoje preskaŭ hazarde - la tiaman direktoron de la lingva fako de la Universitato de Tunja, kiu, precize, serĉis profesoron de franca lingvo. Mi kandidatiĝis kaj estis elektita.

Cl.- Ĉu viaj kolombaj studentoj fariĝis bonaj francparolantoj?

M.- Jes, sed nur kelkaj, kiuj, poste alvenis al Francio kaj studis en Besançon. Nuntempe, ili instruas en la Universitato de Tunja. La aliaj studis la francan lingvon precipe por kapabli legi ĝin kaj ĝian literaturon.

Cl.- Se mi ne eraras, vi ankaŭ instruis la francan literaturon kaj vi doktoriĝis.

M.- Jes, tio estis mia plej grava tasko kaj mia plej kontentiga realigo.

Cl.- Ĉu vi konservis kontaktojn kun esperanto en Kolombio?

M.- Bedaŭrinde, ne.

Cl.- Ĉu vi opinias, ke esperanto povus helpi al la instruado de fremdaj lingvoj, ekzemple ĉe la Universitato en Tunja?

M.- Jes, ĝi multe povus helpi, sed ne nur ĉe la Universitato Tunja - kvankam ĝi estas unu el la plej gravaj universitatoj kolombiaj por la lingvistoj. Precipe, esperanto povus helpi por la taŭga kompreno de la propra gramatiko - tio estas, de la hispana - kies manko terure komplikas la instruon, ekzemple, de la franca.

Cl.- Kaj subite vi revenis en Svislandon. Okaze de unu el viaj feriaj revenoj en Svislando, vi vizitis la centron, kiun ni tiam ekkreis, kaj vi esprimis vian intencon foje kunlabori al ĝia dinamismo. Kaj vi fakte efektivigis tiun ĉi kvazaŭ kunlaborpromeson, ofertante vian laborhelpon, kaj Kultura Centro Esperantista tuj dungis vin kiel administranton. Vi tuj havis multe da laboro ĉu ne ?

M.- Jes, sed mi ŝatas labori, speciale en agrabla etoso. Aliflanke, via afableco kaj kompreno farigas la laboron facile eltenbla, eĉ se ĝi abundas.

Cl.- Ĉu Kultura Centro Esperantista korespondas al tio, kion vi imagis, proponante vian helpon ?

M.- Ĝenerale jes, ĉar vi antaŭe parolis al mi pri viaj projektoj.

Cl.- Vi estis for de Svislando dum dudek jaroj. Ĉu vi rimarkas multajn ŝanĝojn?

M.- Jes, mi rimarkas multajn ŝanĝojn kaj, ofte sentas min konsternita.

Cl.- Kiaj estas tiuj ŝanĝoj?

M.- Precipe teknikaj kaj materiaj, ĉar, se oni parolas pri homa pensmaniero, ekzemple, mi dirus ke ĝi ne multe ŝanĝiĝis. Homoj, nuntempe same kiel antaŭ dudek jaroj, preskaŭ ĉiam preokupiĝas nur pri bagatelaj aferoj.

Cl.- La venontan semajnon ni kune raportos pri la aktiveco de Kultura Centro Esperantista per la legado de partoj el la raportoj, kiujn ĵus akceptis la Ĝenerala Asembleo de la Centro. Tiel vi akiras ideon pri la hodiaŭa situacio de KCE.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond babilis kun Michel Frésard, la administranto de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!